
# Programo de KKPS

| **Ven** | **Salono** | **Ĉambro / ekstere** |
|---|---|---|
| 15:00 | | Vizito fromaĝmuzeo |
| 16:00 | Akceptejo | |
| 18:00 | Vespermanĝo | |
| 19:30 | Interkona vespero | |
| 21:30 | Trinkejo kun koncerteto | Ludejo |
| **Sab** | **Salono** | **Ĉambro / ekstere** |
| 8:30 | Matenmanĝo | |
| 10:00 | NEJ-membrokunveno | |
| 11:00 | Korea kaj japana kongresoj | NEJ-estrarkunsido |
| 12:00 | Tagmanĝo | |
| 13:00 | | Promena ekskurso |
| 16:00 | IJK 2020 | |
| 16:30 | Danckurso | |
| 18:00 | Vespermanĝo | |
| 20:00 | Halovena balo | |
| 21:30 | Diskejo | Ludejo |
| **Dim** | **Salono** | **Ĉambro / ekstere** |
| 8:30 | Matenmanĝo | |
| 10:00 | Verdaj skoltoj | |
| 11:00 | Trejnsesio pri varbado | |
| 12:00 | Tagmanĝo | |
| 13:00 | KKPS 2020 | |
| 14:00 | Purigado | Purigado |



# Pos-Amiko

**Aŭtuno 2019, numero 30**

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## INDEKSO:


1. Krizo pro matenmanĝkuponoj
1. Esp-istoj observas antikvan tradicion
2. Britujo plu konkursas kun UEA
2. KKPS serĉas lokon en Nederlando
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ


## KOLOFONO


Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.



Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

http://kkps.esperanto-jongeren.nl/eo:Pos-Amiko


## Krizo pro matenmanĝkuponoj

La Germana Esperanto-Junularo alfrontas novan financan krizon, kiun kaŭzis heredo de eksmembro. La longtempa aktivulo estis adega partoprenanto de la Internacia Seminario, kaj kolektis imponan kolekton de nomŝildoj kaj aliaj memoraĵoj dum la jaroj. Inter ili ankaŭ troviĝis stoko da neuzitaj matemanĝkuponoj. La heredanta filino venis al la sidejo de GEA kaj poste al tiu de GEJ por konverti la kuponojn al mono.

Kvankam la asocio asertas, ke la kuponoj ne estas ŝanĝeblaj al mono, ili povus daŭre esti validaj por ricevi matenmanĝon. Kaj ĉar la Internacia Seminario plu ekzistas en la formo de JES, la polgermana teamo nun devos stoki amason da panoj kaj ŝmiraĵoj por plenumi siajn jurajn devojn.

Por certigi, ke ne okazu simile en estonteco, la JES-organizantoj planas veki ĉiujn ĉeestantojn matene je la 7:00 per sonorilo, por certigi, ke neniu maltrafu matenmanĝon.

## Esperantistoj observas antikvajn tradiciojn

Grupo de verdaj sciencistoj faris historian esploron en neenloĝata parto de Nederlando. Fosante profunde ili trovis strangan manĝaĵon, kreitan el putriĝinta lakto prenita el vivantaj bovinoj.

La ĉefesploristo, F.R. Maĝo, priskribas: “En la nuntempa verda veganema mondo tio estas apenaŭ imagebla, sed iam la lokanoj vere manĝis tion. Dum festoj, sed ankaŭ sur pano aŭ eĉ sur aliaj manĝoj.” La grupo planas prezenti siajn rezultojn venontsomere en scienca kongreso en Someren.

## Britujo plu konkursas kun UEA

Al la multjara konkurso inter la nova retpaĝo de UEA kaj la Briteliro ĉi-semajne aldoniĝis nova ĉapitro. La brita parlamento petis kaj ricevis nesurprize plian prokraston de sia eliro el la Eŭropa Unio. La nova celita kaj kompreneble jam dubinda celdato estas la 31-a de januaro 2020. Rezulte plu ne certas, kiu okazos pli frue: la Briteliro aŭ la publikigo de la nova retpaĝo de UEA.

Ambaŭ projektoj anonciĝis en 2013, sed nur en marto 2017 la du samtempe ekhavis veran progreson kaj limdaton. La retpaĝo laŭ tiama plano devus esti preta post unu jaro, kio evidente ne okazis. Sed ĉar la planita limdato por la Briteliro ankaŭ ne realiĝis, Britujo kaj UEA plu restas en konkurso.

Intertempe la nuraj homoj, kiuj vere profitas de la prokrastoj kaj ĥaoso, estas la vetoficejoj, kaj kompreneble Libera Folio.

## KKPS serĉas lokon en Nederlando

La loko de la venonta KKPS ankoraŭ ne estas konata, sed almenaŭ unu programero el ĝi estas konata. La organizantoj de la amata renkontiĝo planas ekskurson al montetpinto. Ĉar nederlandanoj ne kutimas pri grimpado, la ekskurso inkluzivos antaŭan kaj postan tranokton proksime (kiu jam rezerviĝis). Tiel jam estas programo kaj ejo por du noktoj kaj du tagoj, sed ankoraŭ mankas loko por okazigi la renkontiĝon mem.


## Ĉu Nederlando tro povas en TEJO?

Joop Kiefte: “Tute ne. Eble TEJO devus iĝi eksterlanda sekcio de NEJ.”

# NEJ-Novaĵoj!

Ne plu atendu. Je **dimanĉo la 3-a de novembro** finiĝos la unua kaj plej favora aliĝperido por la Internacia Junulara Kongreso je 11-18 julio 2020!

Bonega alirebleco. Rapidega vifio. Granda trinkejo kun frititaj manĝoj kaj noktaj koncertoj. Ĉu vi loĝos lukse, amase aŭ tende, ĉu vi manĝos vegetare, vegane aŭ viande, kaj ĉu vi al-venos fluge, trajne aŭ bicikle, la IJK en Someren bonvenigos vin.




*Kie dormos vi?*

La unika junulargastejo De Hoof ofertas 248 litojn, grandan amasloĝejon kun profesia kuirejo kaj grandan kampon por tendumantoj. Ĝia unika trinkejo es-tas perfekte izolita por festi ĝis la nokto-, noktofino.

Ne plu atendu, rigardu tuj la kotizojn kaj kondiĉojn, kaj aliĝu per **https://ijk2020.tejo.org**!

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Aliĝu nun jam al IJK 2022 por havi negativan kotizon.

**Taŭro:** Vi malkovros, ke pli interesas trajnado ol trejnado.

**Ĝemeloj:** Kunportu orelŝtopilojn por diskejo aŭ parolado kun italoj.

**Kankro:** Zorgu pri la planedo: ne plu aŭtveteru al necesejo, promenu aŭ biciklu.

**Leono:** Memoru: ne ekzistas leĝo kontraŭ dentobrosado per mustardo.

**Virgulino:** Post promenado en naturparko vi ne plu estos.

**Pesilo:** Helpu aliajn homojn, ĉiumonate donacu sangon aŭ renon.

**Skorpio:** Vi ne aliĝis al KKPS kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**MICHAEL BORIS:** Kio bongustas, tio eĉ pli bongustos fritita.

**Sagitario:** Tenu kontakton kun via familio per Telegramo aŭ telegramo.

**Kaprikorno:** Ĉu via kato jam parolas Esperanton? Se ne, kial ne?

**Akvisto:** Invitu amikojn por kradrosti, kaj malamikojn por kradrostiĝi.

**Fiŝoj:** Nederlandoj certe ne rimarkus, se vi kunportus unu bovinon hejmen.